

Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44300 NANTES, Francujo

JARABONO

Jarabono : 65 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44300 Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61 L

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1988 - 1


(JANUARO-FEBRUARO-MARTO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... La historio de la Kastelo Grésillon



... Antikva Egiptio

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jeannine Vincent, B.P. 54, 49150 Baugé.

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

	paĝo
El Grésillon	1
Esperanto tra la Mondo (A. Frangeul)	2
La kastelo Grésillon	3
Kial oni manĝas "terpomojn" en Esperantujo (B. Golden)	4-5
Paĝo de la geknaboj (A. Childs-Mee)	6
Niaj planedoj (H. Röllinger)	7
Bufonoj (1-a parto)-(S. Boniol)	8-9
Kio estas "ŝauabtio? (F. Clary)	10-11
La Hardvibele (J.A. Kraemer)	12
Elvolvado- poemoj (J. Poirand)	13
Por via distro	14
La Vivo en Grésillon	15-16

El Grésillon

Post trimonata relative milda vintro, la Esperanto-Domo estas preta akcepti la unuan ĉi-jaran staĝon ek de la 2-a de aprilo. Sajnas, ke la kurs-gvidantoj, aŭ gvidontoj, ne atente legis nian programon aŭ ne estas liberaj dum la Printempaj Ferioj, aŭ, eble, ankoraŭ ne elvintriĝis. La fakto estas, ke ne multaj aliĝis al la speciala kurso pri lingvo-instruado, kiun ni enprogramigis. Tamen rimarkinde estas, ke ne nur francoj aliĝis.

Kiam la suno fariĝos printempa kaj somera, espereble la geamikoj, kiuj jam instruas Esperanton aŭ intencas instrui la lingvon konscios, ke ili bezonas interŝanĝi ideojn kun la aliaj: tion oni ĉiam kaj pri ĉio bezonas. Ili tiam memoros, ke, en Gresillon, dum la somero okazos diversaj kursoj starigitaj favore al ili sub la gvidado de specialistoj pri praktika pedagogio.

Krom tiuj kursoj okazos, dum la somero, la kutimaj tri nivelaj kursoj kaj prelegserio. Claude Piron certe pruvos al la ĉeestantoj de la semajno "Cu ni verku Valane?", ke en multaj kapoj dormetas verko-kapabloj. Jam venis multaj aliĝoj kaj informpetoj.

Venu inter la mezo de junio kaj la fino de aŭgusto al la Kultura Esperanto-Domo. Venu por renkonti novajn amikojn. Ne hazarde argentina samideanino skribis antaŭ kelkaj tagoj:" Mi ne povas preterlasi la okazon gratuli pro la laboro, kiu ne estas vana en la koro de tiuj, kiuj profitis ĝin. Tio taŭgas kiel ekzemplo kaj fortigas nian entuziasmon."

Esperanto tra la Mondo

LA 73a U.K. EN ROTERDAMO- La temo de la kongreso, kiu okazos de la 23-a ĝis la 30-a de julio, estos:" Scienco kaj tekniko por internacia kompreniĝo". La kongresa komitato planas grandajn abundon kaj varion de la programeroj, kiuj traktos la temon. Speciala sekcio de la programo traktos la agadon de UEA kadre de ĝia 80-jara jubileo. UEA povas sendi serion de belaj afiŝoj pri la kongreso.

LA KONGRESO 1988 DE S.A.T- Por la dua fojo la kongreso de S.A.T. okazos ekster la eŭropa kontinento, ĉijare en Campos do Jordao, ŝtato de Sao Paŭlo, en Brazilo. La dekdua postkongreso antaŭvidas vojaĝon de 3 000 km. per buso tra la lando. Adreso por informoj: SAT, 67 avenue Gambetta, F-75020 Parizo.

LA INTERNACIA JUNULARA KONGRESO- Ĝiu kongreso okazos en Zagreb, inter la 15-a kaj la 22-a de julio. Informoj: Kroatia Esperanto-Ligo, Amruševa 5/1, YU-41000 Zagreb. La temo de la kongreso estos: "Komunikado en la 21-a jarcento" kun multaj interesaj teknikaj allogaĵoj kaj laborsekcioj.

CSEH-METODA INSTRUADO- Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, 2585 HW Den Haag, Nederlando, kiu okupiĝas pri disvastigo de la Cseh-metodo kaj trejnado de Cseh-instruistoj, vigle agadas. Interalie ĝi reeldonis "Baza Cseh-kurso" kaj kunlaboras nun kun Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj. Jam pluraj personoj profesiiĝis kaj estas dungeblaj por grupoj de komencantoj. Kursoj laŭ la Cseh-metodo okazos en Grésillon dum la venonta somero, kie okazos ankaŭ Seminario A de Cseh-metodo por instruistoj. Mendu la programon ĉe: Esperanto-Domo Gresillon, F-49150 Baugé, Francio.

SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ- En la kadro de la Universitato de Lieĝo, en Sart-Tilman, Belgio, okazos sesio de Someraj Universitataj Kursoj de la 1-a ĝis la 13-a de aŭgusto 1988. Kvar temoj estas antaŭviditaj: lingvistiko-literaturo, sociologio,stereografio kaj ekologio. Informas: José Jacob, B.P. 62, Liège X, Belgio.

PRI KOMPUTILOJ- Laŭ informo de Esperantista Komputila Klubo, 200 Newells Rd., Letchworth, Herts., S66 4TZ, Britio, du britaj firmaoj produktas sofvarojn, kiuj ebligas la uzon de esperanto.

EŬROPA ASOCIO- Stariĝis la Eŭropa Federacia Esperanto-Asocio, kiu intencas interalie kunlabori kun la Eŭropa Movado. EFEA limiĝas al la 21 landoj de la Eŭropa Konsilio de Strasburgo. Informas: P.H. van Terswiga, Dorpstr. 33, NL-8899 A.B. Vlieland, Nederlando.

EL ĈINIO- 2-a Internacia Akademia Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en esperanto, organizita de la Ĉina Akademio de Sciencoj okazos en Pekino, 10-16-a de aŭgusto. Antaŭ ĝi, inter la 16-a de julio kaj la 8-a de aŭgusto okazos, en esperanto, kurso pri Akupunkturo.

EN KOREIO- Korea Esperanto-Asocio nombras 900 membrojn. Ĝi posedas oficejon kun 4 oficistoj, kiuj regule vendas librojn. La prezidanto de la Asocio estas unu el la tri vic-prezidantoj de Korea Olimpika Komitato.

HISTORIA REVUO PRI LA MOVADO- Jam ekaperis nova esperanta revuo, "Historiaj Studoj", kiel jara revuo de la novfondita Societo pri la historio de Esperanto. Informas la sekretario: Hilary Chapman, 8, Vardre View, Pentywyn Rd., Conwy, Gwynned, LL31 9TE, Britio.

La kastelo Gresillon

(Artikolo aperinta en loka gazeto, kaj tradukita de lernantoj de la 3-a grada kurso en Baugé)

La kastelo Grésillon, kiu akceptas nun la esperantistojn de la tuta mondo (esperantismo, kies centjariĝon oni festas ĉi tiun jaron), staras de tre longa tempo en la Baugé-aj pejzaĝoj kaj historio.

Ĝi fakte okupas privilegiitan lokon, ĉe la dorsflanko de la altebenaĵo, ĉe la kunfluejo de pluraj riveretoj: la Anserponto, la Kapucenoj, la olda Fluo, kiuj formas la Altrée-rivereton. La prahistoriaj homoj, kiuj starigis je malpli ol 1km birdfluge, la belan dolmenon de la Kovrita Ŝtono, unu el la plej gravaj en Anĵuo, verŝajne loĝis tie. Ĝis la XVI-a jc. Grésillon dependis de la Rondellière, posedaĵo de la familio Le Bigot, kiu entenis multajn reĝajn oficistojn kaj juĝistojn, ĉefe François Le Bigot. La unua nobela domo estis konstruita ne longe post 1585. La tiama alirvojo ankoraŭ rekoneblas pro la taluso, kiu superstaras la herbejojn nun dependantajn de la Rondellière, kiam oni iras sur la vojo al Pontigné.

La unua komunuma lernejo- En 1685, la sinjoro de Grésillon estis René de Charbonnière. Poste sekvas lin la familio Commeau. Unu el la familianoj, Pierre Commeau, aparta leŭtenanto de la Baugé-a seneskalejo, kunvokis en 1724 la ĝeneralan kunvenon de la korporacioj kaj grupoj de loĝantoj por starigi, laŭ la instigo de pastro Maignan, la unuan komunuman lernejon. Lia nepo, Pierre-Marie, estas reĝa prokuroro, poste urbestro dum la Konvencio, de 1792 ĝis 1794. Poste ni trovas lin juĝisto ĉe la tribunalo kaj ano de la subprefekta konsilio. Auguste Commeau, juĝisto ĉe la Baugé-a tribunalo, magistratano sub la dua Imperio, akceptis en Grésillon, en la tempo de la Restaŭrado, sian pranevon, Clément Myonnet, el anĵua familio, kiu estis lernanto de 1824 ĝis 1829 en la Baugé-a lernejo, al kies fondiĝo kontribuis la praonklo Pierre Commeau, kaj libertempis en Grésillon, ĉe Auguste Commeau.

Clément Myonnet, kies karitatema personeco jam manifestiĝis per la honor-premio, kiun li ricevis elekte de siaj kamaradoj, estis la fondonto de la komunumo de l'religiuloj de S-ta Vicento-de-Paŭlo. La centjaran datrevenon de lia morto oni festis en 1986, speciale per ceremonioj en la Angers-katedralo, en Paris ĉe la ĉefdomo, strato Vaugirard. Kajeron de la komunuma revuo oni dediĉis al la restado en Baugé-a regiono de la frato fondinto.

En 1878 Auguste Commeau mortas senida kaj lia nevino, Valentine Chesneau de la Haugrenière, edzino de Laurent Ferrière de Coutrolles, heredas Grésillon. La familio Ferrière ludis, de la XVII-a jc., gravan rolon en la Baugé-a regiono. Justic-oficistoj ĉe la seneskalejo, unu el ili estis deputito ĉe la leĝofara Asembleo, alia estis urbestro kaj transformis la centron de Baugé. Li taŭgordigis la Kastelo-placon, kiu havas lian nomon, kaj konstruigis la Justic-palacon kaj la malliberejon.

Nobel-domo kaj -nomo- Laurent Ferrière estas parenca kun multaj gravaj bienuloj kaj kastelanoj el la Baugé-regiono. Liaj gepatroj akiris la nobelnomon per la aĉeto de la nobel-domo de Coutrolles en Echemiré, 5 km. for de Baugé. Tial gravas al la nova okupanto de Grésillon doni al tiu malnova loĝejo novan aspekton, ĉar estas la epoko de la florado de kasteloj laŭ la modo Ludoviko la XIII-a aŭ la transira stilo de la gotikaj formoj al la pure renesancaj formoj, de kiuj la fama arkitekto René Hodé estis la iniciatinto. Ni citu en la regiono la kastelon de Perray en Le Vieil-Baugé, Roche-Hue en Cheviré-le-Rouge, Grifferais en Echemiré.

La novaj posedantoj do penis transformi la malnovan kastelon de la XVII-a jc., kiu, laŭ la kadastro de 1834, konsistis el 1-etaĝa ĉefkonstruaĵo flankumita de du longaj aloj, sur la loko de la nuna kastelo. Tiu vasta rezidejo kaj ĝiaj kromkonstruaĵoj estas tutaĵo tre interesa.

Kial oni manĝas "terpomojn" en Esperantujo

Malĝusta nomo por la ĝusta legomo

La demanda vorto en la titolo estas "kial", ne "kiel", do ne atendu receptojn por la kuirado de terpomoj. La terpomo en Esperanto estas same aĝa, kiel la lingvo mem. Ne temas pri tiu amelriĉa kulturplanto sed pri ĝia nomo, kiu estas Fundamente registrita en Universala Vortaro. Sed kiu pensas serioze pri botaniko kaj lingvistiko, povas meti jenan demandon: kial la esperanta vorto por tiu universale disvastiĝinta legomo, kies taksonomia nomo estas "Solanum tuberosum", estas kunmetita per la du radikoj "ter-" kaj "pom-" Kvankam la tubero kutimas kreski en la tero sub la surfaco de la grundo, ĝi neniel rilatas al la arba frukto, la pomo, nek aspekte nek taksonomie. "Ter-" en "terpomo" povas signifi (1) substancon: pomo el tero, (2) devenon, originon: pomo de tero, aŭ (3) kvaliton:tersimila pomo.

Estas evidente, ke "terpomo" estas misgvida vortformo, same kiel "sukerpomo", kiu ne estas "pomo el sukero" sed tute alia fruktospecio, la tropika anono (Annona squamosa). Ankoraŭ unu ekzemplo estas "terpiro", kiu ne estas speco de piro sed legomo nomata pli precize tubera helianto aŭ topinamburo. La tri cititaj kunmetaĵoj spegulas la komunuzajn vortojn en etnolingvoj, sed tiuj ĉi ne estas racie pravigeblaj, kiel bazoj de terminoj en planlingvo. Kiel, do, oni trovu la plej ĝustan vorton por "terpomo" laŭ scienca kaj interlingvistika vidpunktoj ?

La DEFIRS-sistemo por determini internaciecon en planlingvoj

la plej gravaj kriterioj por elekto de vortoj en planlingvo estas la neambigueco kaj la internacieco. Aŭtoroj de planlingvoj kutime uzas la DEFIRS-sistemon por trovi la plej internaciajn etimojn, kiuj estas uzeblaj por formi la vortprovizon de iliaj lingvoprojektoj. DEFIRS estas akronimo(*) formita per la inicialoj de la sekvaj lingvoj: Deutsch (germana), English (angla), Français (franca), Italiano (itala), Russkij (rusa) kaj Spanish (hispana). Komparo de la vortoj en la ses DEFIRS-lingvoj montras, ke ne ekzistas unusola radiko signifanta "terpomo", kiu estas komuna al ĉiuj: D. Kartoffel, E. Potato, F. pomme de terre, patate, I. Patata, R. kartofel, kartoŝka, S. Patata, papa. La listo indikas en frapanta maniero, ke la plej internaciajn vortformojn havas FEIS: F. patate kaj IS. patata estas preskaŭ identaj, kaj E. potato estas tre simila. La alia grupo, DR, havas nur du membrojn: D. kartoffel kaj R. kartofel. Tute izolita estas F. pomme de terre; tamen, tiu formo estas la modelo, kiun Zamenhof uzis por formi la nomon de la koncerna legomo en Esperanto.

Nomoj en aliaj lingvoj

Komparo de la nomoj de terpomo en aliaj lingvoj reliefigas la diversecon. La radiko "potat-" aperas en sveda "potatis" kaj norvega "potet", dum vortoj bazitaj sur la germana "kartoffel" estas rumana "cartof", dana "kartoffel", pola "kartofel", bulgara "kartof" kaj latva "kartupelis" Ankoraŭ unu radiko troviĝas en ĉeña "zemák", slovaka "zemiak" kaj pola "ziemniak". Kvara radiko estas "krompir" kiu havas la formon "krompir" en la slovena kaj serbokroata lingvoj kaj "kompir" en la makedona. Unikaĵo estas hungara "burgonya", kiu devenas de la franca provincnomo Bourgogne (Burgonjo). Vojaĝanta hungara botanikisto vidis la legomon tie la unuan fojon kaj portis ĝin al Hungario kune kun la franca loknomo. La franca nomo "pomme de terre" estis uzata la unuan fojon en 1716, kiel traduko de la latinaj vortoj "malum terrae" (frukto de la tero). Ekzemploj de la sama maniero formi la nomon per traduko de la franca esprimo estas nederlanda "aardappel" kaj turka "jer elmasi".

Historio de la terpomo

Ĝis nun ne estis menciitaj la latina kaj helena vortoj por terpomo; la kialo estas, ke tiu

legomo ne estis konata en la Malnova Mondo en la antikveco. Ĝi estas indiĝena planto de Ameriko, kies prahistoria habitato (**) estis la altejo de Peruo kaj la norda Bolivio. La hispanaj esploristoj de la 16-a jarcento portis la terpomon al Eŭropo, kaj en la 17-a jc. ĝi rapide disvastiĝis tra la tuta kontinento de Hispanio kaj Italio al la nordaj landoj. Alia esploristo, Kavaliro Walter Raleigh, trovis terpomojn en la nordamerika brita kolonio Virginio kaj enkondukis ilin en Anglion en 1584.

"Tubero en la afero"- la nomoj "patato" kaj "batato"

Ĉar la vegetaĵo estis tute nova por eŭropanoj, ili alprenis la indiĝenan nomon kaj modifis ĝin fonetike. Angla "potato" venas de hispana "patata", kiu siavice devenas de vorto en la lingvo de la antilaj indianoj:"batata". Sed la origina signifo de "batata" estas "dolĉa terpomo", tropika legomo apartenanta al tute alia genro kaj specio " Ipomoea batatas". En etnolingvoj estas uzataj jen la etimo "batata", jen traduko de "dolĉa terpomo", jen ambaŭ rimedoj.

D. batate, süsse Kartoffel
E. batata,sweet potato, Spanish potato
F. patate douce
I. batata
R. batat
S. batata

En la unua tempo okazis konfuzo en la Esperanta leksikografio, ĉar estis registritaj la radikoj "patat-" kaj ankaŭ "batat-" por la sama legomo. Tamen, nuntempe la uzado estas preskaŭ tute unuforma; la dolĉa terpomo estas "batato" kaj la vortformo "patato" estas malaprobita.

La nomo "kumara"

La plej interesa parto de la historio de la dolĉa terpomo rilatas al ĝia nomo "kumara" uzata en Sudameriko kaj en Oceanio. Kiam la hispanaj esploristoj atingis la Novan Mondon, ili trovis, ke la dolĉa terpomo estas kultivita de la indianoj tie. Jam estis menciite ke la kariboj nomis ĝin "batata"; en Meksiko ĝi nomiĝis "camote" kaj en la regiono de la sudamerikaj Andoj, la keĉuoj de Peruo kaj Ekŭadoro uzis la nomon "kumara".

En alia parto de la mondo, la brita esploristo Cook gvidis ekspedicion en la Pacifika Oceano en la 18-a jc. kaj eksciis, ke la dolĉa terpomo estas la plej grava nutroplanto en la tuta Polinezio, de Havajo oriente ĝis Nov-Zelando okcidente. Kaj eĉ pli mirinde, ĝi estis konata laŭ la nomo "kumara" aŭ ĝia variaĵo "kumaa" !

Plantoj ne estas dufoje inventitaj

Kiel povas esti, ke en du malproksimaj partoj de la mondo troviĝas la sama vegetaĵo kun la sama nomo? Botanikistoj insistas, ke plantoj ne povas esti dufoje inventitaj. Tio signifas, ke se identa specio aperas en diversaj lokoj, la sola maniero klarigi tion estas per transportado de la vegetaĵo mem aŭ ĝiaj radikoj aŭ semoj.Tio povas okazi laŭ natura vojo, kiel klarigas jena hipotezo: radikoj de la sudamerika "kumara", envolvitaj en arboradikoj, falis en la maron kaj drivis okcidenten al Polinezio. Sed jen la dua tubero en la afero. Kvankam tiuspeca migrado de vegetaĵoj povas okazi, iliaj nomoj ne povas tiel vojaĝi transmare. Nur la homo kapablas disvastigi nomojn de plantoj de unu loko al alia. Pro tio estiĝis dua hipotezo:(a) polineziaj vojaĝantoj, kiuj akiris famon kiel lertaj navigantoj, alvenis al la sudamerika marbordo, trovis la dolĉan terpomon kaj, hejmenirante, portis kun si la novan legomon kaj ties indiĝenan nomon;(b) sudamerikaj indianoj velis okcidenten plurajn milojn da marmejloj kaj enkondukis la dolĉan terpomon kaj la nomon "kumara" en Polinezion. Oni taksas, ke la limo de ĝermkapablo de la dolĉa terpomo estas unu monato aŭ ses semajnoj.

B. GOLDEN

Glosoj:(*) akronimo - vorto aŭ nomo konsistanta el la inicialoj aŭ unuaj silaboj de plurvorta nomo aŭ esprimo.

(**) habitato - la loko aŭ tipo de loko, kie vegetaĵo aŭ animalo nature vivas kaj kreskas.

PAĜO DE LA GEKNABOJ

Ekde la 14a de novembro 1987, farmbestoj en Svedio ne plu vivos en staloj, sen ebleco vagadi en kampoj dank'al Astrid Lindgren. S-ino Lindgren, fama sveda aŭtorino de infanlibroj, batalis dum multaj jaroj kontraŭ tiu malbona sistemo, kaj , okaze de ŝia okdek-jariĝo, la sveda parlamento faris leĝon por malpermesi la sistemon.

Astrid Lindgren, kreinto de tiu nekutima knabino Pippi Longŝtrumpoj ricevis multajn literaturajn premiojn. Pasintan jaron aperis en esperanta traduko ŝia libro "La Fratoj Leonkoro" Ĝi ne rilatas al fama reĝo de Anglujo Rikardo Leonkoro. La naŭjara rakontanto klarigas jene:" Jonatano ne nomiĝis Leonkoro dekomence. Lia familia nomo estis Leono. Mi nomiĝas Karlo Leono kaj patrino Sigrida Leono. Patro nomiĝis Johano Leono, sed li forlasis nin, kiam mi estis nur dujara. Li fariĝis maristo kaj de tiam ni neniam plu aŭdis de li. Sed mi volis rakonti, kiel mia frato Jonatano fariĝis Jonatano Leonkoro, kaj pri ĉiuj mirindaj aferoj, kiuj poste okazis."

La aferoj, kiuj poste okazis ja estis mirindaj, kiel ankaŭ la lando, kie ili okazis. Ĝi nomiĝas Nangijala. Ĝi estas lando de fabeloj, de monstroj kaj herooj, de tiranoj kaj kavaliroj. En tiu lando Jonatano kaj Karlo spertis tiajn aventurojn, kiajn la plimulto el ni vivas nur en fantazio.

Karlo naskiĝis malforta kaj malsana. Li ne longe vivos, diris ĉiuj. Jonatano, kvar jarojn pli aĝa ol Karlo, estis forta, belstatura, sana kaj tiel bonkora, ke ĉiuj amis kaj admiris lin. Jonatano tre amis sian etan fraton, kiun li nomis "Biskoto". Li vartis lin, konsolis lin kiam li malĝojis, gajigis lin per ludado, kantado, rakontado kaj, speciale, per sia kunestado. Ne mirige, ke eta Biskoto adoris sian fraton kaj trovis tion stranga, ke Jonatano povus tiom ami lin, kiu "neniam estis alia ol malbela kaj sufiĉe stulta kaj timema knabeto kun kurbaj gamboj kaj tiel plu". Jes, sed estas surprize, kiajn heroaĵojn kapablas fari timema knabeto por helpi al frato, kia Jonatano, en lando, kia Nangijala. Jen ekzemplo: Karlo rajdas malantaŭ Jonatano sur unu ĉevalo. Rajdistoj de la tirana armeo postĉasas kaj komencas proksimiĝi al ili. Subite Karlo komprenas, ke nur sen li Jonatano savus sin. Li rajdus pli rapide kaj neniu atingus lin. Li faras decidon: " Jonatano, faru kiel mi nun diros. Faligu min malantaŭ kurbiĝo, kiam ili tion ne vidos. Kaj atingu Orvaron!" Unue li surpriziĝis, tion mi rimarkis. Sed ne tiel kiel mi surpriziĝis pri mi mem. "Ĉu vi vere kuraĝas?" demandis Jonatano. "Ne, sed mi tamen volas fari tion," mi diris. "Eta, kuraĝa Biskoto," li diris. " Mi revenos por preni vin. Tuj kiam Orvaro estos sekura ĉe Matiaso, mi revenos." "Ĉu vi promesas tion?" mi diris.

Ni nun atingis la salikon, kie ni banis nin, kaj mi diris: " Mi kaŝos min en nian arbon. Trovu min tie!" Ne estis tempo por diri pli, ĉar nun ni estis kaŝitaj, malantaŭ deklivo, kaj Jonatano bridis la ĉevalon, tiel ke mi povu ŝovi min malsupren. Poste li denove ekrapidis. Kaj mi tuj flankenruliĝis en kaveton."

La aventuroj ne finiĝas per tio. La plej teruraj ankoraŭ okazos - pro perfido, tiraneco, bataloj kaj malbonŝanco. Ĉu ĉio finiĝas bone? Tion mi ne malkaŝos, sed mi opinias, ke neniu leganto antaŭvidas la finon.

La tradukinto estas s-ino Kerstin Rohdin, kaj mi, kiu ne kapablas legi la svedan lingvon, estas tre danka al ŝi, pro la bonŝanco koni tiun sorĉan rakonton, kaj dividi kun vi mian plazuron.

Audrey

NIAJ

PLANEDOJ

Dum unu momento en la jaro 1982, refoje, post 179 jaroj, ĉiuj planedoj de nia sunsistemo grupiĝis, dum siaj rotacioj ĉirkaŭ la suno, sur la sama flanko de l'suno en unu linio; tiun unikan konstelacion montras la ĉi-suba desegnaĵo.

Inter la orbitoj de la planedoj Marso (distanco de l'suno ĉ. 230 milionoj da km.) kaj Jupitero (distanco de l'suno ĉ. 780 milionoj da km.) cirkulas depost ĉ. 4,5 miliardoj da jaroj i.m.a. du difinitaj asteroidoj (malgrandaj planedoj) oficiale nomitaj " Esperanto " kaj " Zamenhof ".

En la faka revuo " Minor Planets Cirkular " (= Asteroida Cirkulero), n-ro 1350 de la 26-a de januaro 1956, eldonita de la Universitato en Cincinnati (Ohio), oni legas:


" (1421) ESPERANTO = 1936FQ. Malmkovrita fare de Y. Vaisälä la 18-an de marto 1936 en Turku. Nomita omaĝe al la internacia lingvo proponita de L.L. Zamenhof en 1887 por ĝenerala scienca uzado. La aŭtoro uzis la pseŭdonimon " Doktoro Esperanto ".

" (1462) ZAMENHOF = 1938CA. Malkovrita fare de Y. Vaisälä la 6-an de februaro 1938 en Turku. Nomita honore al L.L. Zamenhof (1859-1917), pola kuracisto kaj aŭtoro de la internacia lingvo " Esperanto ".

Prof. d-ro Y. Vaisälä (1891-1971) estis elstara finna esperantisto prezidanto de l'Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE). Grava kunlaborintino de prof. Vaisälä estis L. Oterma.

Informojn pri asteroidoj donis s-ro J. Strönne, Malmö, kaj d-ro W.A.Verloren van Themaat.

Kompilis: Hugo Röllinger



BUFONOJ

Laŭlonge de nia okcidenta civilizacio konstantan fascinadon naskis la triopo saĝulo-frenezulo-bufono. Des pli en Francio, ĉar la ununura vorto "fou" laŭbezone signas, kaj alienulon, kaj ŝajnan mensmalfortulon -fakte burleskulon-. Eĉ rimarkindas, ke la ŝakfiguro esperantlingve titolita "kuriero", ricevis en la franca la saman taksadon pri frenezeco. Espereble la ĉi-subaj konsideroj helpos la leganton iom forigi la duban sencon de tiu konfuziga nocio kaj malmunti psikajn meĥanismojn pli malsimplajn, ol kiom oni povas opinii dekomence.

Pri frenezeco en dia kulto- Dum la mezepoko inter kristnasko kaj Epifanio okazis la tiel-nomata "festo de la frenezuloj", alivorte "festo de la stultuloj" aŭ "festo de la senartifikuloj". Kie estos la limo de kolektiva histerio kaj senbrideco? Pri tio maltrankviliĝis la ekleziaj aŭtoritatoj. Ĉar la kristanoj sin dediĉadis al ia seninterrompa psikodramo sub neimageblaj maskovestaĵoj. Dum la meso en la epifania tago celebrata, oni elektis la episkopon, aŭ papon, de la frenezuloj. La celebranto estis li, kun mitro surkape, sub sonado de dibocaj rekantaĵoj. Eĉ haladzon oni estigis en la preĝejo. Kaj oni moke defiladis

Aparta variaĵo de tiu festo titoliĝis "la festo de l'azeno" kaj unuarange famiĝis tiuokaze la katedralo en Sens (Burgundio). Dum la XIII-a j.c. la episkopo mem aranĝis ties disvolviĝon. Ĝi konsistis el negativa liturgio. Ĉu en la Sanktaj Skriboj azeno ne simbolas voluptamon kaj nescion? Eĉ en la monaĥejoj oni celebradis la feston de la frenezuloj. En la preĝejon oni retropaŝe enirigis riĉe ornamitan azenon, honore al kiu oni kantadis la diservon. Spite la ripetiĝantajnnnnadmonojn de la klerikaro kaj laikaj altranguloj, larĝan toleremon oni elmontris koncerne tiun feston. Kion ĝi signifis? La inversigon de la regorilatoj sine de la eklezia hierarkio. Ĝi enkondukis la ideon pri universala valorrenverso, pri neniigo de la potenco: eklezia, socia kaj politika. Malaperos tiu kutimo, kiam malmoliĝos la regorilatoj: subpremanto ridon jam ne toleras, tio estas lia omaĝo al ĝia potenco. En 1552 decido de la parlamento en Dijon malpermesos la feston de la frenezuloj Notindas en tiu afero la anstataŭigo de la eklezia povo per la politika.

Sed ni revenu al tiu stranga solenaĵo. La predikantoj burleske grimacis, eĉ peze ŝercis por trafi ne tre subtilan popolamason, sine de kiu, krome, ili vivis. Tiu festo donis al la homoj malkunpreman oportunon. Kiel skribis sorbona doktoro:" Krevus la vinbareloj, se foje oni ne detirus la daŭbŝtopilon." Tia ne malhavebla malkunpremo malkongestis subprematajn konsciencojn de ne fleksebla liturgio laŭlonge de la jaro. Kaj kvankam la ekleziaj altranguloj klopodis malpermesi la feston de la frenezuloj, ili vivtenis bufonojn ĉe si. Francisko la unua bufonon donacis al la papo Paŭlo la tria; en 1738 la bufono de kardinalo de Fleury surhavis la samajn vestaĵojn, kiel la kardinalo mem kaj estis titolita " episkopa moŝto ".

Pri la ulo kun la bufona sceptro- Kio estis la bufona vesto? Ĝi konsistis el azenorela ĉapo per tintiloj ornamita kaj el la tiel-nomata "bufona sceptro". Fine de la XV-a j.c. la sensencula figuro fascinadas per siaj simboloj: minaco kaj insultomoko; kapturniga senprudenteco de la mondo; homaj ridindeco kaj malgrandeco. La sensenculo ne estas perceptata, kiel natura kaprico, ia unikaĵo, sed kiel heroldo de la gento de Antikristo superregata. Jen valororenverso: de la patologia kampo (sensenculo egalvaloras monstran apartaĵon) transirante al la metafizika, la koncepto pri sensenculo, ĝis

tiam riĉa je pozitivaj valoroj (ĉar la alienuloj estas, samkiel la malsanuloj kaj malriĉuloj la dorlotatoj de la eklezio), seniĝas je tiuj valoroj, prezentonte la enkarniĝon de la malbono, perturbemon, spontanan furiozon supersaltantan la barojn de moralo kaj religio, unuvorte la malamikon de la socio kaj de la valorskalo. En la sensenculo malbridiĝas la nekonsciaj ruinigaj impulsoj. Sensenceco, iam pozitiva, iĝas negativa laŭ la bildokonceptaĵo de la bufonsceptrulo, kiun la Mezepoko asimilas, ne al Satano, sed al ia regresa demono al bestiigo tiranta. Nek korpo, nek vizaĝo estas la sensencula bildo; nur simbolaj atributoj.

Oni estis dekutimiĝinta de la uzo de la ĉapo en la epoko, kiam per ĝi oni kapvestis la bufonon. El ĝi sole elstaras la homvizaĝo sur bestomasko reliefiĝanta. Koncerne la segidentan kamizolon kun romboformaj pecoj, ĝi simbolas malkoncentriĝon kaj nestabilecon. En la zono, dekstraflanke videblas orkolora glavo; kaj maldekstraflanke la bufona sceptro, t.e. bastono, el kie pendas ŝvela porkoveziko plena je pizoj, samkiel la bufona kapo plenas je ŝtonetoj. Sonanta korpo, jen la bufono; malforta tintado kunpaŝas. La bufonbastono estas la vanta ekvivalento de la reĝa sceptro. Ĝi estas la propra miniatura bildo de la bufono (franclingve la bufona sceptro nomiĝas "marotte". Tio devenas de la antaŭnomo Maria, per kiu oni nomis pupon).

La vestkoloroj estis la flava kaj la verda. Ankaŭ buntis la bufono. La flavan oni elektis pro tio, ke troa enspirado de safrano naskas nebrideblan ridegon kaj difektiĝon de la nervo-sistemo. Krome la flava, al la Judoj aljuĝita, estas simbolo de malsupereco kaj senhonorigo. La verda, mezepoke, signas ruinon kaj honton; oni ĝin trudis al tiuj, kiuj bankrotis. Buntaĵo, siaflanke, estas signo pri malkohero. La sensenculo situas je la limo inter besteco kaj homeco. Survesti la bufonan uniformon signifas retiriĝon el la homsocio, desupron ĝis la nana, simia, krimula aŭ leprula kondiĉo. Dank'al kronikistoj kaj elspezoraportoj ni scias kiom malavaregaj estis la reĝoj kaj altranguloj al siaj bufonoj: riĉajn vestaĵojn, juvelojn, sennombrajn ŝuparojn ricevis ĉilastaj. Ĉe la kortego la bufona vesto ofte konsistigis kopion aŭ mokan falsaĵon kompare kun tiu de la reĝo.. El tio montriĝas, ke la bufono estas ia groteska duplikato de sia mastro, la renversita bildo de la povo.

Pri la kolektiva bufono- Li partoprenis en la urba kaj korporacia vivo. Multaj frataj societoj prezentis laikan transprenon de la festo de la frenezuloj. La "urba bufono" amuzis siajn kunloĝantojn okaze de la karnavalo kaj dum multaj festoj. Kvankam li ofte apartenis al la respektindularo, li ricevis dungomonon.



Okaze de la geedziĝaj festoj la bufonoj ĵongliste rolis. Multaj korporacioj havis siajn bufonojn, kiuj petoladis dum la festo de la sankta protektanto. Fine de la Mezepoko estiĝas bufonaj societoj en Eŭropo. Tio ne estas kampo por fantaziaĵoj de unuopuloj sed firmaj reguloj regas. Ĉikaze notindas vera fordirekto de la fenomeno: jam ne temas pri anarkia impulso de la nekonscio, sed malsaĝo estas proponata, kiel etiko. Malordo estas ekzorcizata, pravigata. Iam psikodramo, ĝi iĝas spektaklo kaj tiele estas taksata kvankam ĝi ne perdas sian signifopovon.

S. Boniol

(Fino en la venonta numero)

Kio estas

ŜAUABTIO ?

"Ŝauabti", aŭ "uŝebti" estas statueto lokita de Egiptoj en la tombojn ek de 1800 a.K. Ilia alteco estas de 10 ĝis, malofte, 60 centimetroj. La origino de la vorto estas mistera; iuj asertas, ke ĝi devenas de la egipta vorto "uŝeb", kiu signifas "respondi", kaj aliaj de la vorto "ŝauab", nomo de iu arbo, la "persao", el kiu, eble origine, ili estis skulptitaj.

La ŝauabti estas ĝenerale mumiforma kiel la dio Oziriso: nur la kapo kaj la brakoj elmontriĝas el la mortotuko. La manoj tenas terkulturajn ilojn: du plugpioĉojn. Dorse pendas sako. La materialo tre diversas de la plej simpla ĝis la plej luksa: ligno, ŝtono, bronzo, ofte blua aŭ verda fajenco, maldelikata terkoto kolorŝmirita, nura argilo malprecize mumiforma. Ankaŭ la nombro varias laŭ la epokoj kaj la riĉeco de posedanto de la tombo: de unu ĝis 700! En la tombo de Tutanĥamono kuŝis 413, pli ol unu por ĉiu jartago.

La celon de la ŝauabti oni konas dank'al la teksto tre ofte skribita sur la statueto mem. temas pri la 6-a ĉapitro de la Libro de la Mortintoj. Tiu libro konsistas el kolekto, aŭ aro, da ruzaĵoj, magiaĵoj, sorĉparoloj kaj formuloj. celantaj helpi la mortinton transmonde, kontraŭ la demonoj, super ĉiaj danĝeroj de la postmorta vivo, por ke ĝi identiĝu kun Oziriso, dio de la mortintoj kaj de la renaskiĝo, kaj vivu en la ozirisa paradizo, la kampoj de Ialu. Ankaŭ por ke ĝi akompanu tage la sunan dion Ra-on en ĝia taga barko kaj nokte en ĝia nokta barko. Ĉar ĉiun matenon Ra-o renaskiĝas, naskita de la ĉiela diino Nut-a, en kiu ĝi vojiras barke. Ĉiun vesperon ĝi vojiras daŭre barke, sed subtere.Tie ĝi luktas kontraŭ la demonoj, ĉefe kontraŭ la malbona, giganta serpento Apofi.

Apofi simbolas malbonecon kaj havas ununuran ideon en sia malvasta cerbo: gluti la Sunon.

Oni ne imagu tiun Libron de la Mortintoj, kiel libron tre bele binditan. Ĝi figuras skribita sur la tombomuroj, steleoj kaj papirusruloj lokitaj apud la mumio aŭ inter ties bendetoj.

Jen la celo de la ŝauabtio, laŭ la 6-a ĉapitro de la Libro de la Mortintoj: " O, ŝauabtio de Tia-Tia (sekvas nomo kaj titolo), ci aŭskultu min! Kiam oni vokos min pri tia laboro, kian oni farigas al la animoj en la transmondo, ci sciu, o Ŝauabti, ke cin kaj ciajn ilojn koncernos tiu laboro. Ĉiumomente la voktoj de la Subtera Mondo, la Duat, vokos cin anstataŭ min, por prisemi aŭ irigacii la kampojn aŭ transporti sablon de oriento al okcidento. -Jen mi, mi obeas al ciaj ordonoj - tion ci respondu".

Do, la ŝauabtio estis substituito de la mortinto, anstataŭanto, magia servisto, unuvorte kvazaŭa ĉionfaranta roboto. Ĝi faru ĉiujn laborojn, kiujn la mortinto devas plenumi por Oziriso. Kaj do, dume la mortinto ĝuis agrablajn tagojn en la Ozirisa Paradizo: ĝi ĉasis, fiŝkaptis, manĝis en mirebela naturo kun fruktodona kamparo. Ĝia animo liberigita kaj simboligita per homkapa birdo flugis tra la kamparo.

La morto tre impresis la Egiptojn kaj la postviva problemo multe okupis ilin. Laŭ la Egiptoj, la mortinto havis, transmonde, la samajn bezonojn ol surtere. Do, necesis, ke ĝi havu en sia tombo nutraĵojn, ĉasarmilojn, fiŝkaptilojn, tualetaĵojn, ktp... Iom post iom oni anstataŭigis tiujn "solidaĵojn" per nuraj bareliefoj kaj pentraĵoj. La nura magio de la figurado sufiĉis, ĉar la vorto kaj la bildo estas povokreaj. Ju pli ripetata estis nomo, despli bone ĝia posedanto vivos transmonde. Male, se oni forgratis ĝin, tiam la posedanto mortos do dufoje: por ĝi nenia postmorta vivo, kaj neniu povos ĝin nomevoki transmonde.

Multegaj faraonaj nomoj, kies posedanton oni malamis, malaperis tiamaniere: nun neniu kapablas nome voki ilin; ilia destino estas havi nenian eternecon.

Sendube la "ŝauabtia" industrio tre prosperis, kaj nun oni facile povas vidi, en la muzeoj, tiajn statuetojn, kies aŭtentikeco ne povas tikli la muzeestrajn cerbojn, kiel la multe pli kostaj kaj ĉefaj faraonaj monumentoj!

Sed tre ofte oni povas vidi faraonajn ŝauabtiojn, kiuj tenas enmane la du reĝajn sceptrojn, (kaj tiuokaze etaj agrokulturaj iloj estis lokitaj apude), aŭ la du plugpioĉojn. Sur ilia kapo oni vidas la faraonan kaj nur tomban kapvestaĵon, la "nemeso"n.


(Tre ofte la vivantaj faraonoj estas reprezentataj kun tiu nur tomba kapvestaĵo en la amerikaj filmoj!)

Do, eĉ la faraono devis labori transmonde, kvankam li estis dio. Ĉu la egiptaj tekstoj ne diris pri li, kiam li mortis: " La dio supreniris al sia horizonto"? Tamen oni povas tremi pro la ideo, ke eble tiuj statuetoj origine anstataŭis verajn homojn. Estas eble, ke antaŭ la unuaj dinastioj, oni enterigis la mortintan faraonon kun liaj vivantaj servistoj. Sendube estis antikva ideo por ne koni...laborecon. Sed pri tio oni tute ne certas.

Françoise Clary

HIEROGLIFA VORTARO DE RAYMOND FAULKNER

(University Press - Oxford)



LA HARDVIBELE

La regiono de Alzaco, kiu troviĝas inter Mulhouse kaj la svisa landlimo nomiĝas "Sundgaŭ" t.e. suda distrikto.

Kiam oni alproksimiĝas al Colmar aŭ al Belfort, oni trapasas pitoreskajn vilaĝojn; oni vidas tipajn Alzacajn domojn kun pintaj tegoltegmentoj, kaj blankŝmiritaj muroj kun videblaj nigre-brunaj traboj kaj verdaj lignaj ŝutroj. Ankaŭ la kamparo estas vidinda; ege fruktodonaj kampoj alternas kun belaj foliarboj, kiujn oni klasifikas inter la plej riĉaj en nia lando. Ili ofertas al la turistoj mil kaj mil agrablaĵojn, precipe belajn sanigajn promenadojn.

Survoje oni vidas de malproksime montaron, kiu ŝajne baras la irvojon alsudan; Ĝi estas la alzaca jurasa montaro. Ĉe la komenco de tiu montaro kuŝas la urbeto plej malgranda en Francio "Ferrette", kies historio estas riĉa kaj varia. En la urbodomo vi povas admiri leterojn de princoj kaj reĝoj, eĉ de la imperiestro Karolo la Granda; kaj ankoraŭ nun la princo de Monako estas Grafo de Ferrette.

La urbeto sin apogas kontraŭ kruta deklivo, kaj la kulmino de la monto estas kronita de malnova kastel-ruino. Ne forgesu viziti la proksiman arbaron; vi certe renkontos kapreolojn eble kelkajn aprojn; je ĉiu paŝo vi ekvidos abiojn, fagojn, multajn speciojn de arbustoj. Vi malkovros truitajn ŝtonegojn, grotojn kaj kavernojn, pli malpli profundajn. Ĉiuj havas sian legendon, precipe la groto, kiu troviĝas en la arbaro, oriente de la urbeto.

Markita pado kondukas ĝis fendita kruta roko; tra tiu fendo homo povas sin enŝovi. Oni rakontas, ke de tie elvenis antaŭ longlonga tempo la Hardvibele. Laŭ la legendo la Hardvibele estis gekoboldoj bonfarantaj. Ili helpis la vilaĝanojn semi, rikolti, plugi,k.t.p. Se fulmotondro minacis la rikolton, tuj la Hardvibele alkuris por kolekti la fojnon aŭ la tritikon. Se kompatindulino endormiĝis sur sia laboro, la Hardvibele silente ariĝis por kudri, fliki, purigi la domon, lavi la tolaĵojn. Sed la homoj estas maldankemaj kaj de ĉiam maldiskretaj. La Hardvibele estis vestitaj per longaj roboj, kiuj kaŝis iliajn piedojn. Neniu iam vidis eĉ pinton de iliaj ŝuoj; tio mirigis la homojn, precipe la virinojn. Ne sufiĉis, ke la Hardvibele montris siajn manojn kaj bonkorecon; ne, la virinoj deziris vidi iliajn piedojn. Ili estis sciavidaj malkovri la sekreton: "Kial la etuloj kaŝas tiel zorge siajn piedojn?".

Iun vesperon kelkaj scivolemaj virinoj disŝutis cindron antaŭ la enirejon de la groto, kaj la sekvantan tagon ili vidis postsignojn similajn je la postsignoj de anseroj; tial ili deduktis, ke la etuloj havas palmajn piedetojn; tio multe amuzis la tutan loĝantaron. La Hardvibele, aŭdinte la ridegojn kaj ŝercaĵojn, konfuziĝis kaj rifuĝis en sian groton. Ili neniam plu montriĝis al la homoj.

Tamen okazas, ke iu patrino nestas sian infanon ĉe la arbarrando, inter la radikoj de maljuna kverko aŭ de giganta fago, antaŭ ol sarki trankvile sian terpomkampon, aŭ kolekti la sekan fojnon dum la varmaj tagoj de junio. Revenante ili trovas la infaneton dormanta kaj ridetanta. Tiam ŝi diras:"la infaneto ridetas al la anĝeloj", ne pensante, ke ĝi eble ludis kun la Hardvibele. Ofte ŝi trovas apude kelkajn florojn nomatajn "arbarreĝino" (Asperulo odora), precipe dum la tago de somera solstico. Ŝi ne rimarkis tiujn floretojn antaŭe kaj ŝi ne povas klarigi al si, kiel la infaneto sukcesis kolekti bukedon; eble estas memordonaco de la Hardvibele? Se hejme ŝi metas la bukedon en la tolaĵŝrankon, ili bonodorigas la tolaĵon precipe, kiam ili estas velkintaj.

J. A. Kraemer

ELVOLVADO

Lekanto malfermiĝas,
Heliko tentaklojn dispelas,
Amanto forlasiĝas,
Pensulo analizas,
Spiralo malvolviĝas.

Dum ekdormas cetonio
Akacia sur folio,
Lulas ĝin la vento kaj el malproksimo
Miras la pasero.
Sed la birdo, cetonio, eĉ folio kaj poeto:
Ununura melodio
De l'venteto ja fratino.

Kokcinelo ĉe la pugno,
Nu, ĉagrenoj, iru for
Kokcinelo ĉe la fingro
De la fid' garantiaĵo
Kokcinelo ĉe la koro
La rubeno de l' feliĉo
Kokcinelo en la mano
Jen ekflugas la destino.

Iam en vesper',
Kokcineloj en ĉielo
Estis gutoj el sango.
La maribestojn, Didonacojn
Trafis forges' fare de Di'
Kruela pli
Ol sango.
De la lumkrio distruataj
Ili la ombron surŝprucadis.

En la gorĝo najtingala
Estas larmoj el lunlumo,
Mortolakto
Jam delonge ĝin murdinta ĉe l' tagiĝo.

Jen mi kantas:
Sangrivero disfluadas tra la gorĝo najtingala.

Iu maldormas tie supre,
Krestohavul' ĉe cedropinto:
Jen ĝi la korv' lunglutema,
Je tempo kaj veoj plena.

La libro de l' saĝeco
Sur tablo malfermitas
Dum pikon hom' suferas
De moskito.

verkita de

Jacqueline POIRAUD

blinda poetino

KIAM BESTOJ

EN MALFESTO

(eltiraĵo)

tradukita de Simone BONIOL

POR VIA DISTRO

LITERA ENIGMO

La solvo konsistas el 50 literoj, kiuj estas numeritaj. La literoj estas troveblaj helpe de la sekvantaj ŝlosilvortoj:

35-36-2-19-20-9-8-49-50: parolanta maŝino
42-41-40-39-38-37: longkola kvarpiedulo
11-12-33-8-7-27-40-37: nazkorna mambesto
10-1-3-25-15-14-33-4-36-20: vira nomo
31-30-29-26-5-50: manportebla kofreto
21-20-28-48-47-8: fluaĵo en la buŝo
13-16-23-24-17-20: dunaskito
44-18-46-34-23-43-49-4-11-37: akva kvarpiedulo
45-25-29-6-5-32-50: religia komunumo

1...50: sprita diraĵo de la angla poeto Oscar Wilde

****

Solvo de la antaŭa enigmo

	D		K		P		B		M		K
V	A	K	U	P	U	R	I	G	A	D	O
	K	R	I	E	G	A	S		L	U	M
S	T	E	R	O	N		K	A	Ĉ	U	O
	I	T	I	N	E	R	O		A	L	D
A	L		L	I		E	T	O	S	O	
	O	R	A		A	D	O	P	T		G
A	G	E	R	A	T	O		I	A	M	A
	R	A		P	E	N	I	N	D	A	j
R	A	D	I	O	L	O	G	I	O		H
	F	A	N	G	O		L	A		F	U
G	I	P	S	I		T	A	M	T	A	M
	S	T	U	L	T	A		A	E	R	O
Ŝ	T	A	L		I	R	O	J		I	R
	I	D	I	S	T	O	N		E	Ĝ	A
A	N	O	N	C	I	S	T	I	N	O	j

LA VIVO EN GRESILLON

NI FUNEBRAS

La Jubilea Jaro ne alportis nur ĝojigajn, kuraĝigajn eventojn. Pro tio la "Vivo en Grésillon" cedas la lokon al kelkaj vortoj pri la malapero de homoj, kiuj forte influis la esperanto-movadon, laŭ siaj propraj ecoj kaj stilo, kaj helpis al la disvastiĝo de la Internacia Lingvo.

La 14-an de oktobro oni anoncis la forpason de D-ro Pol DENOEL. Esperantisto jam en sia junaĝo, Pol Denoël aktivis en la movado dum sia tuta vivo. Prezidanto de la Belga Esperanto-Federacio, estrarano de UEA, li iniciatis la Trilandan Renkontiĝon jam antaŭ la Dua Mondmilito. Liaj artikoloj kaj libroj pri instruado de Esperanto renkontis grandan atenton. Li estis konata, kiel klarvida, diplomateca kaj afabla homo.

La 13-an de novembro Danlando ploris la malaperon de Paul NEERGAARD. Internacie konata pro sia laboro pri sempatologio, Paul Neergaard estis membro de diversnaciaj Akademioj de Sciencoj kaj Esploristaj organizoj. Li ankaŭ estis membro de la Honora Patrona Komitato de UEA kaj Akademiano. Tre frue konvinkita pri la estonteco de Esperanto, kiel scienca lingvo, li aperigis fakajn popularigajn verkojn en Esperanto:" Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj", "Vivo de la plantoj". Tiu lasta verko estis tradukita el esperanto en dekon da naciaj lingvoj. Paul Neergaard interesiĝis ankaŭ pri esperantologio. Li aperigis diversajn tiutemajn studojn kaj eseojn. Li redaktis ses kajerojn de la revuo " Esperantologio".

La 30-an de novembro forpasis Norbert BARTHELMES. Germandevena, vivanta en Francio, Barthelmes apartenis al la laborista Esperanto-movado dum pli ol 75 jaroj kaj fariĝis kolono de la SAT-movado. Dum longaj jaroj li estis redaktoro de "Sennaciulo" kaj antaŭ kelkaj jaroj aperis lia libro " Ne plu estas ludo". Neforgesebla figuro li restis en la memoro de tiuj, kiuj kontaktis lin eĉ nur unufoje. Lia tuta vivo estis longa dediĉo al Esperanto.

La 15-an de decembro, en la Zamenhofa Tago de la Jubilea Jaro, forpasis Ivo LAPENNA. En tri monatoj ĉio estis dirita pri li. Novaj vortoj ne aldonos ion al la multaj artikoloj dediĉitaj al la iama prezidanto de UEA, kies agoj kaj sukcesoj sur la internacia kampo estis grandaj. Ni nur citos kelkajn el la paroloj de la nuna prezidanto de UEA, Humphrey Tonkin, laŭtlegitaj ĉe la kremacia ceremonio." Profesoro LAPENNA estis la arkitekto de la moderna UEA... Li insistis pri la plej altaj normoj en la lingvouzo kaj pri la respekto al la humanecaj idealoj de la Internacia Lingvo... Li estas aparte memorata, kiel brila oratoro kaj talenta verkisto... Sian sindediĉon al la idealoj de libereco kaj homaj rajtoj li montris per sia partopreno en la lukto kontraŭ faŝismo kaj multjara pledado pri la homaj rajtoj."

Vi legas paĝon 16

EVENTO !

Ĉar jam de tre longe Kulturaj Kajeroj aperis kun nur 14 paĝoj. La buĝeto de la revuo ekvilibriĝis, kaj, por danki niajn fidelajn legantojn en 23 landoj, tiuj du pliaj paĝoj estos senpagaj ĝis la fino de la jaro 1988. Nur en 1989 la abonprezo iom altiĝos.

Ne forgesu regule pagi vian abonon. Reklamu ĉirkaŭ vi. Abonigu aŭ abonu viajn konrespondantojn , viajn amikojn, viajn klubojn, la bibliotekon de via urbo. Dank'al via helpo, dank'al via malavareco (65 ff. estas la baza prezo), ni certe sukcesos fari al vi novajn surprizojn.

LA

LIBRO-SERVO

de la ESPERANTO-DOMO GRESILLON proponas al ties membroj grandan nombron da lastatempe aŭ pli frue aperintaj libroj.

Petu la katalogon al:

J. VINCENT
BP 54, F-49150 BAUGE



RESTAS NUR KELKAJ TAGOJ

al vi por pagi vian abonon 1988

Vi povos eviti al ni kroman laboron

PAGU TUJ

al

P. BABIN, 13, bd de la Chauvinière

44300 - Nantes -- Francujo
p.k. Nantes 2813-61 L

(nur per ĉeko)

aŭ al via peranto

NIA KONKURSO

Solvo de la antaùa enigmo : (K.K. 87-4)

La trovotaj 24 vortoj estis : leporo — pomado — masoni — sopiri — piloto — lotuso — tuniko — nikelo — kerubo — rubeno — berilo — rimeno — mediti — dinaro — Napolo — poluso — lukano — kataro — tapeto — pesilo — sireno — rebuso — butero — telero.

Inter la partoprenintoj estis dislotataj la jenaj premioj :

200 f.f. al : Jacqueline Gonin, Lyon.

100 f.f. al : Gesroj Huberdeau, Le Mans.

50 f.f. al : Odette Bernet, Boulogne-Billancourt.

Ili ricevos nian katalogon, el kiu ili povos elekti la libro(j)n.

❖

NIA TUTJARA KONKURSO

Ek de tiu ĉi numero (K.K. 88-1) komenciĝas nova granda konkurso, kiu daŭros dum la tuta jaro (4 sinsekvaj numeroj). En ĉiu numero estos proponitaj enigmoj kaj ludoj. La partoprenantoj rajtas sendi siajn solvojn post ĉiu serio aŭ post la lasta. Gravas nur, ke **la tuto atingu nin antaŭ la 1-a de marto 1989.**

La premioj estos :

1 - 1 000 f.f. por restado en Grésillon.

2 - 500 f.f. por restado en Grésillon.

3 - 200 f.f. por aĉetado de libroj ĉe nia Libro-Servo.

4 - 100 f.f. por aĉetado de libroj ĉe nia Libro-Servo.

5 - 50 f.f. por aĉetado de libroj ĉe nia Libro-Servo.

UNUA SERIO

1 — Trovu la respondojn al la jenaj demandoj. Facila ekzerco se vi atente legis la revuon.

— Kial oni opinias, ke prahistoriaj homoj vivis sur la tereno, kie nun staras la kastelo Grésillon ?

— Kial Y. Vaisälä devus esti pli bone konata de la esperantistoj ?

— Kial oni trovas, en la egiptaj tomboj, ĉasarmilojn kaj fiŝkaptilojn ?

— Kial la ĉefaj koloroj de la bufonaj vestoj estas verdo kaj flavo ?

— Kial la nomo de la « terpomo » en la hungara lingvo estas unika ?

2 — Jen frazo en kiu mankas la vokaloj. Trovu la kompletan tekston. Temas pri frazo skribita de L.L. Zamenhof al D-ro Kimel.

« L plj grv lĝdnnt sts l zd ».

3 — Kiuj esti la du fakaj ĉefverkoj, kiuj D-ro Paul NEERGAARD (1907-1987) aperigis en 1954 kaj 1957 ?

4 — Ĉu la ĉi-subaj asertoj estas veraj aŭ neveraj ? Respondu « jes » aŭ « ne ».


— La unua filmo en esperanto estis produktita en 1929.

— La 1-a rezolucio de UNESKO favore al Esperanto estis akceptita en 1956.

— Bertalan Farkas, hungaro, estas la unua kosmonaŭto esperantista.

— La verkisto Claude Piron estas sviso.

— IEAJ signifas « Internacia Esperanto-Asocio de Juĝistoj »-n.



Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (220 aŭstr. ŝil.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (7.00 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (80 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (60 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 2347 59-601 (25 mk.).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10ᵉ-D 03003 ALICANTE - (1 300 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (15 us. dol.).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (180 n.l.).

Japanio : S-ro Tara Niŝiumi, section Seiyoshi, ĉuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2500 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (15 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Peppelrode, chambre 418, ds. Th. Fliednerst. 5. 5631 BM EINDHOVEN.

Norvegujo : S-ino Louise Bœ Marmarvn 2A Oslo 11 (60 kr.).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (15 us. dol.).

Svedujo : Sveda Esperanto-Federacio Brunnsgatan 21, S. 11138 Stockholm poŝtkonto : 20123 (65 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (22 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — Nº C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN